

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA KAJ KLERIGA KUNULARO ĈE ONV PRAHA 2

aranĝas

ESPERANTAN SEMINARION

Oktobro ĝis decembro 1951.

PROGRAMO DE PRELEGOJ:

- | | |
|--|---|
| <p>A.</p> <p>6. X. JUDr Tomáš Pumpr: Verba aspekto en Esperanto kaj en la ĉeĥa lingvo.</p> <p>13. X. PhDr Augustín Pitlík: Historio de internacia Esperanto-movado I.</p> <p>20. X. Ota Ginz: Ĉiutaga Esperanto.</p> <p>27. X. Rudolf Hromada: Interesajoj de la Esperanta gramatiko.</p> <p>3. XI. PhDr Augustín Pitlík: Historio de internacia Esperanto-movado II.</p> <p>10. XI. Antonín Slanina: Kiel instrui laŭ Ĉe-metodo (ekzempla leciono).</p> <p>17. XI. Josef Vítek: Kiel instrui laŭ nereakta metodo (ekzempla leciono)</p> <p>24. XI. Dolfa Bartošík: Esperanto, potenca faktoro de l'nacia kaj int. kulturoj.</p> <p>1. XII. Rudolf Hromada: Ĉeĥoslovaka Esperanto-movado.</p> <p>8. XII. Jaroslav Mařík: Historio de la mondlingvo.</p> | <p>B.</p> <p>RNDr Miroslav Pulchart: Plej novaj esploroj en naturscienco (Darwin, Miĉurin, Lysenko).</p> <p>Adolf Malík: Belarto en socialista socio</p> <p>PhDr Stanislav Kamarýt: Problemo de internacia lingvo.</p> <p>Josef Vítek: Psikologio de instruisto kaj de oratoro.</p> <p>Otto Skleněka: Pri proleta internaciismo.</p> <p>PhDr Stanislav Kamarýt: Evoluo de homa socio laŭ marks-leninisma instruo</p> <p>Ing. Ladislav Krajíc: Problemoj de nuntempa mekanikigo (lumbildoj).</p> <p>RNDr Miroslav Pulchart: Atomenergio dum paco kaj en milito.</p> <p>Jaroslav Šustr: Alberto Bobowski, Ali-Bey, mezepoka poligloto 1610—1672.</p> <p>Adolf Malík: Signifo de Esperanto kaj ĝia tasko en nuna tempo.</p> |
|--|---|

La prelegoj okazas en Ženský klub (Virina klubo) Praha II, Smečky 26 ĉiun sabaton de la 18.30 horo.

A. prelego	18.30—19.45 h.	B. prelego	20.00—20.45 h.
paŭzo	19.45—20.00 h.	diskuto	20.45—21.00 h.

Dimanĉoj- matene (9-a horo):

Vizitoj al vidindaĵoj de Praha (8×). 18. XI.: Kultura horeto.

2. XII.: Vizito al Konferenco de Esperantistaj aktivuloj el ĉiuj regionoj de ĈSR.

ESPERANTISTA KLUBO EN BRNO

Esperanto-Rondeto ĉe Osvětová Akademie Komenský
invitas vin al

JUBILEA KUNVENO LA 17.—18 NOVEMBRO 1951

aranĝata por festi la 50-jaran ekziston de la Klubo
en Kult. dům Jos. Jurana, tř. J. Masaryka.

Sabate la 17. XI. 1951 je la 20-a horo: Amika
vespero kun amuza programo.

Dimanĉe la 18. XI. 1951 je la 9.30 horo: Solena
kunveno kun rememoroj pri la 50 jaroj,
arta programo.

Esperantista Klubo en Brno, fondita en 1901, estas la
unua Esperanto-Klubo sur nia teritorio. La nuna jaro
fakte estas la 50-a jaro de la Esperanto-movado inter
la ĉeĥoj, fondita de Th. R. Čejka.

Bonvolu informi nin pri via veno kiel eble plej baldaŭ.
Kiu deziras tranokti la 17-an de novembro, skribu tuj
al la adreso: Jos. Vondroušek, prez. de E. K., Botanická
31, Brno.

Svaz esperantistů Československé republiky
svolává

PRACOVNÍ KONFERENCI

na neděli 2. 12. 1951 v 8,30 h. do SLOVANSKÉHO
DOMU, Praha I, Na příkopě 22,

které se zúčastní funkcionáři esperantských odborů
v závodních klubech a Osvětových besedách, klubů a
odboček Svazu esperantistů, krajští, okresní a místní
důvěrníci a ostatní esperantští pracovníci za účelem
výměny zkušeností z dosavadní činnosti v závodních
klubech, Osvětových besedách a masových organizacích.
V sobotu dne 1. 12. se koná pro účastníky konference
přednáškový večer Esperantského semináře v Zenge-
rově posluchárně Českého vysokého učení technického

v Praze II, Resslova 9. Začátek v 18,30 hod.

Zájemcům, kteří se závazně přihlásí do 15. 11., obstará-
me 50 % slevu na dráze, případně noclehy v hotelu.

KOLOMAN KALOCSAY SESDEK-JARA

Li estas la plej elstara figuro en Esperanto-literaturo inter la du miloj.

Antaŭ ĉio li estas efektiva poeto, kiu scias redoni en lingvaĵo nekutime bela tiujn sentojn, kiujn vi ekkonas kiel viajn proprajn, sed de vi neesprimeblajn. Ekzistas multaj liaj poemoj originalaj, kolektoj sole tri: „Mondo kaj koro“ el 1921, „Streĉita kordo“ el 1931, kaj humoraj „Rimportretoj“ ankaŭ el 1931.

Plue li estas tradukanto de poemoj. De poemoj tre diverstemaj kaj diversformaj. La unuaj estas versita popolfabelo de Petöfi „Johano la Brava“ kaj 101 hungaraj popolkantoj „Kantanta Kamparo“ ambaŭ el 1923. Sekvis „Tragedio de l'homo“ de Madach, poemantologio el 22 lingvoj „Eterna bukedo“, „Romaj elegioj“ kaj „Taglibro“ de Goethe, preskaŭ ĉiuj poemoj en la „Hungara Antologio“, „La Infero“ de Dante.

Multon li tradukis ankaŭ proze: „Morgaŭ matene“ triakta dramo de Karinty, „Arthistorio“ de Hekler.

Sed li estas ankaŭ funda esploranto de la lingvo. Aperis precipe en „Literatura Mondo“, sed ankaŭ ĉen aliaj revuoj multaj liaj eseoj pri la lingvaj kaj stilaj demandoj. Parto de ili aperis en „Lingvo, Stilo, Formo“ en 1931. Multaj el ili aperis ankaŭ en „Enciklopedio de E.“ Sed la plej gravaj liaj verkoj en tiu sfero estas „Parnasa Gvidlibro“ el 1932 kaj „Plena Gramatiko de Esperanto“ el 1935, dua eldono el 1938, ambaŭ en kunlaboro kun Gaston Waringhien.

Pri poetoj oni iam parolas kiel pri homoj nekapablaj agi en praktiko de la vivo. Ĝi ne ĉiam validas, pri Kalocsay nepre ne. Li estis ankaŭ tre sukcesa organizanto. Kiel ĉefredaktoro de „Literatura Mondo“ dum ĉiuj tri ĝiaj periodoj 1922—1926, 1931—1939, kaj 1947—1949 li estis efektiva organizanto de evoluo de nia literaturo beletristika, en la plej bona senco de la vorto, konsilante, edukante, kritikante, redaktante, ofte sin defendante kontraŭ atakoj ofte atakante kaj tre tre ofte pravante. En tiu ĉi funkcio li faris por ni plej multon. Li vidigis kaj konvinkis la esperantistojn, kiom da poeziaj valoroj enestas en ilia lingvo, kiaj ebloj poeziaj estas donitaj per simpla ekzisto de Esperanto. Inter la du miloj aperis areto de esperantlingvaj artistoj ofte pro ekzemplo donita de Kalocsay kaj pro lia eduka laboro. Tiu verkado de poemoj fare de li kaj de liaj disĉiploj iniciatis ankaŭ grandan evoluon de Esperanto kiel lingvo. Ĝi kreskis pro la taskoj al ĝi donataj kaj pro la servoj de ĝi postulataj. Kaj tiu povo kreski estis inverse plua pruvo de interna lingva valoro de Esperanto. Nur per ĝi estis donita la fina pruvo, ke Esperanto estas helpa lingvo internacia, kiu estas kaj estos uzbla por ĉiuj celoj, por kiuj lingvo povas esti uzata.

Kia estas la viro, iniciatinta tian rapidan disvolvon kaj floradon de internacia lingvo? Lia menso estas nepre ekster serio. Precipe elstaras memorkapablo, penetrema juĝokapablo, intuicio kaj fantazio kontrolataj de nekutime akra intelekto. Kiu volas havigi al si bildon de lia tradukarto foliumu „Eternan Bukedon“, 350 paĝojn de poemoj tradukitaj el 22 lingvoj. Li spertus pri kapablo de tiu ĉi komplika spirito trovi pozitivan kaj admiran sintenon al poetoj ekstreme diferencaj. Eble ŝajnos al vi, ke la tradukanto preferas problemojn formalsmajn, precipe se temas pri tradukmalfacilaĵoj. Sed se vi traleĝis duan fojon: ne la formo altiris la poeton; la redono de sento, de kredo, de espero estis certe lia ĉefa celo.

Sed se vi volas kontakti kun malofta logikeco de pensado kaj klasigado bazantaj sur ampleksa scio, foliumu la „Plenan Gramatikon“. Kaj se vi volas sperti ion pri klerulo, kiu ironias, legu „Parnasan Gvidlibron“. Kaj vi samtempe spertus ion pri amikeco, pri sento kiu kunigas lin kaj la kunaŭtoron, du spiritojn elstarajn.

Sed kiu volas fari al si bildon pri Kalocsay, orga-

nizanto de literatura vivo kaj disvolvo de nia lingvo, tiu nepre foliumu la paĝojn de Literatura Mondo. Tie vi spertus pri detala laborado, tie vi vidos kiel evoluadis Esperanto kiel literatura lingvo kaj kiel ĝi kreskis por naski verajn artaĵojn.

Kiel efektis al tiu ĉi klera spirito sperto de marksismo-leninismo post liberigo de Hungario fare de Sovetia Armeo? Pripensu tion bone kaj logike. Kalocsay fariĝis komunisto kaj dediĉis ĉiujn siajn fortojn kaj kapablojn al konstruado de nova vivo socialista. En j. 1947 aperis en Literatura Mondo liaj kvar sonetoj pri amo al a patrujo. El jaroj 1942, 1944, 1945, 1947. Tiu lasta, titolas „Senrezerve“. Jes senrezerve mi povas ami la patrujon nur nun:

— Sed nun, ho kia sankta sensacio:
revivi bubmemorojn, kanti verve
la Himnon apud la Internacio,
kaj vin patrujo ami senrezerve!

Ankaŭ Literaturan Mondon li dediĉis komplete al servo de socia progreso. Lia sinteno estas okulfrapa pruvo pri progresemo de esperantista poeto. Ĝi estas konsekvenca pensado kaj agado.

Kolomano Kalocsay naskiĝis la 6-an de oktobro 1891 en Abaujszántó. Medicina doktoro li fariĝis en Budapeŝta universitato en 1916. Depost 1929 li estas ĉefkuracisto en Urba Hospitalo por Infektaj Malsanoj kaj docento ĉe medicina fakultato. Esperantisto depost 1913. Alta, bela viro, svelta figuro ankoraŭ en sia sesdeka jaro.

En tiu ĉi numero ni represas lian poemon „Vilagiado“ el 1947. Ĝi estas rava dokumento pri komenca ŝtupo en edukado de vilago al socialismo. Ĝi estis analoga ĉe ni kiel en Hungario. Ni presas samtempe ĉeĥan tradukon de tiu ĉi poemo fare de Miloš Lukáš. S. K.

KONFESO

Dolora tristo, konsolanta kant',
la delikata flustra vort',
kiel en mola ĉirkaŭpren',
rideto pura de la stelamant' — —
ne estas mi, nur ies sort'
la dolĉan vorton en la sven'
ripetas flustre al la nokta stel',
iu en mi per velurald'
elspiras vian nomon kante,
ĝin portas vibre sur tremanta vel'
al nigre blua nokta alt',
kiel infano en demand'
respondon vian atendante .

Estajoj multaj vivas en la kor',
al ĉiuj logas min la tim'
kaj ĉiuj portas vian nomon;
pro ili tintas ruĝa meŝ':
ne estis mi, sed eble nur dolor',
el kies fort' estiĝis krim' —
ho granda Di', nun ŝirmu homon,
ne lasu morti sen konfes'!

Eva Suchardová

Kolomano Kalocsay:

VILAGIRADO

I.

Ŝargaŭto sur landvojo kuras
dimanĉe en mateno frua:
la laboristoj alveturas
vilaĝon en humoro brua.
Al fratoj-kampanoj venas
kun helpo la vilaĝirantoj,
kaj laŭ la voj' la kampo plenas
de gaja laboristaj kantoj:

„Niajn kantojn gaje portas
la vento,
vilaĝiras laborista
taĉmento.
Frat' kampulo, jen la mano,
ĝin prenu,
malriĉulon malriĉulo
subtenu!

La tegmentojn de lernejo
ni faros,
ponton, puton, laborilon
riparos.
Ankaŭ pastro ridu fine
sen veo:
iru bapti al sentrua
preĝejo!“

En vilaĝmezo la ŝargaŭto haltas,
la laborista grupo el ĝi saltas.
Kunvokas la kampulojn la gvidanto
kaj, laŭ la senco de la supra kanto,
rakontas, kial venis lia grupo.
Sed entuziasmon li ne tre rikoltas:
la homoj staras kun suspekta dubo,
kaj liaj vortoj senresone mortas.

Ja suspektinda estas ĉio urba:
sinjora ruzo, kampiltrampo turpa,¹⁾
jen kion memorigas por averto
al la kampuloj la jarcenta sperto
ĉe la aŭskulto de promesoj belaj.
Do ili staras mute kaj rigide
kaj, kvazaŭ ili estus surdorelaj,
disiĝi ili volas malkonfide.

„Aŭskultu, homoj, ni nenion petas,
ni volas helpi!“ la gvidant' ripetas.
„Ĉu vi ne havas ion riparotan,
se ne alian, truan fundon potan?
Riparon ni senpage entreprenas.“
„Pro kio do?“ demandas homo aĝa.
„Pro kio? Nu, ĉar interapartenas
la laboruloj urba kaj vilaĝa.“

Rompigas fine tamen la glacio,
kaj vikle, kun kurioza ambicio
la laborista grupo eklaboras,
martelas, ĉizas,²⁾ gisas, raspas, boras.
Kiel la frat' pli aĝa al pli juna
sindone helpas la vilaĝiranto
al kampu! ĝis la subiro suna,
festante la dimanĉon per ekkanto :

„La marteloj gaje bruu,
la patruĝojn ni konstruu,
hura hej!
Por ni mem ni ĝin konstruas,
nia ŝvito por ni fluas,
hura hej!

Kalocsay Kálmán:

DO VSI PŘIŠLA BRIGÁDA

I.

Je neděle a po silnici
se časně zrána. valník žene:
to do vsi jedou brigádníci
a v náladě jsou rozjařené.
Svou práci bratry venkovany
dnes překvapiti hodlají
a jejich zpěv, tak rozjásaný,
se vůkol nese po kraji:

„S větrem k vám už letí hláhol
jásavý,
za chvíli se brigáda k vám
dostaví.
Bratře ze vsi, podat ruku
jdeme ti,
chudák musí chudákovi
přispěti.“

Nářadí, pak školní střechu,
studnu, most,
všechno si to rádi berem
na starost.
I pan farář bude moci
vesele
křtít děti v opraveném
kostele!“

Ted' stanou na návsi. A s valníku
již seskakuje četa dělníků.
Sem svolá předák lidi z osady
a vysvětlí jim účel brigády
v tom smyslu, jak to v písni předtím pěli.
Leč skoro nikdo není nadšený,
ten počín všem je jaksi podezřelý
a nedochází u nich ozvěny.

Vše z města čertem čpí — toť jejich soud:
Vždy pán chce vesničana oblafnout,
a dokladů je na to dost a dost,
ba staletá již učí zkušenost,
jak nelze dáti na lečjaké sliby.
Tož není divu, také tentokrát
že vypadají, jako ohluchli by,
a v nedůvěře chtějí se domů brát.

„Ej, poslyšte,“ dí předák poznovu,
„my nezištně jdeme prospět venkovu.
Co rozbito kde, to se pospraví —
když nic, tož aspoň hrnec děravý!
A zdarma všechno, jen si dejte říci!“
„Jak to?“ kýs kmet se divit počíná.
„Jak vy, tak my jsme lidé pracující,
je ves i město jedna rodina!“

Tak led se posléz přece prolomil,
a mílo zřít, jak ihned ze všech sil
se celá četa jala pracovat:
vše sbíjet, dlabat, vrtat, pilovat.
Jak brat' když přišel bratru vypomoci,
tak brigádníci na vsi prodleli
v tom díle družném do samé až noci
a světili svou písni neděli:

„Kdekdo měj se chutě k činu,
budujme si domovinu,
hola hej!
Pro sebe to každý dělá,
třebas pot mu kane s čela,
hola hej!

Plan' trijara en la vejnoj,
el la ruboj kreskos hejmoj,
hura hej!
Unu-du-tri-jara duro:*)
por ni floros la futuro,
hura hej!

Hej, brilaj ventoj blovas
flagon en aero,
hej, estas surskribite:
vivu la libero!
Hej, brilaj ventoj blovu;
flago svelu vente!
Ĝis morgaŭ ni la mondon
turnos fundamente."

„Mi jam skribos sur la murgazeto pri mia plendafero
per funebre nigraj literoj sur flamruĝa papero.
Mi subskribos: mian koron ŝtelis de mi ama pirato,
ĝin ordone al mi redonigu la Uzin-Komitato.“)

Sed la U. K. tiel min respondis je akuza pretendo,
ke la U. K. en aferoj amaj estas sen kompetento.
Kies koron oni ŝtelis, tiu ĝin reŝtelu per finto,*)
kaj se lerta, ŝtelu ankaŭ kune koron de la ŝtelinto."

„Jam ree produktas fabrikoj,
kaj muĝas la radoj dum kur',
dirante al mil mil amikoj:
al la laborist' la futur',
al la laborist' la futur'.

La hejm' ree hejmo jam estas,
viv' kreskas el ruboj de mur',
kaj trans ĉia plag' manifestas:
al la laborist' la futur',
al la laborist' la futur'.

Plenigu nin ago kaj volo,
ni kreu en nobla konkur'.
Patrujon konstruas popolo
por la laborista futur',
por la laborista futur'."

Vespere, kiam nia grup' ekiras,
ĉar jam la okan montras la horloĝo,
demandas la gvidant': „Ĉu vi deziras,
ke ni revenu?“ „Jes“ respondas voĉo
de homoj pluraj. Montras jam simptomoj,
ke iom cedas la anim-rezistoj.
Avinjo diras: „Ha vi, bonaj homoj!
Domaĝe, ke vi estas komunistoj.“

(Fino en la venonta numero.)

*) ŝkaredŝ. *) dlabati.
*) tvrdost. *) závodní rada.
*) leŝt. Turpa, Dura, Finto jsou neologismy, užívané zřídka
a obyčejně jen v básních.

Fervojistoj, kiuj volas fariĝi membroj de Internacia
Federacio de Esperanto-Fervojistoj, turnu vin al la Fe-
deracia sekretario Jan Lok, Orteliusstraat 108/III,
Amsterdam (W), Nederlando. Li trovos adoptontojn. La
kotizo estos tiom malalta, ke ĉiu povos ĝin repagi, post
kiam estos eble pagi eksterlanden.

Trojletka nám stoupá do žil,
aby domov z trosek ožil,
hola hej!
Za rok, za dvě, za tři léta
ať nám z dřiny blaho vzkvétá,
hola hej!"

„Hoj, skvělý vítr vane
a vlahku rozevlává,
a na vlahce je nápis:
Bud' svoboděnka zdráva!
Jen vaň, ty větře skvělý,
a dej té vlahce vláti!
My chceme pohnout světem,
ať do zítřka se zvrátí.“

„Napíšu a dám to na nástěnku, že mám stížnost, žalnou
[k nevěře,
smutečným to písmem černým spíšu na ohnivě rudém
[papíře.
Napíšu, že ukradl mi srdce nešťastný jeden loupežník,
závodní nechť rada vyšetří to a nechť o tom vydá
[oběžník.

Jenže u ZR mi nepomohla tahle moje stížnost veliká:
odepsal, že pravomoci ZR tento případ prý se vymyká.
Komu srdce bylo ukradeno, má je lstivě ukrást nanovo;
je-li zručný, může prý si přibrat zároveň i srdce
[krádcovo."

„Zas kola se naplno točí
a výroba se dala v běh
a hlásá to tisícům očí,
že zítřek je v rukou nás všech,
že zítřek je v rukou nás všech.

Zas domov je příbytkem štěstí,
už neleží v zřícených zdech,
a přes všechny nesnáze věsti,
že zítřek je v rukou nás všech,
že zítřek je v rukou nás všech.

Jsme prodchnuti tvořivou snahou,
ta v stálý nás pohání spěch.
My budujem zemi svou drahou —
a zítřek je v rukou nás všech,
a zítřek je v rukou nás všech!"

Když brigáda již odjet chystala se
(vždyť pozdě bylo), ptal se předák její:
„Což, chtěli byste, bychom přišli zase?“
Tu mnozí řekli mu, že vskutku chtějí.
Že propast poněkud je překročena,
nu, o tom svědčily už známky jisté.
„Jste dobří lidé,“ děla stará žena,
„jen je mi líto, že jste komunisté.“

(Dokončení v příštím čísle.)

Doksanøj, fotografintoj, atentu! Por la Esperanto-
muzeo en Kopřivnice ni bezonus ĉiujn fotografajojn fa-
ritajn dum la Somera kolegio de Esperanto, Doksy.
Bonvolu afable sendi ĉiujn specojn al Rudolf Zanaška,
Kopřivnice, Jiráskova 442 kaj sciigi la prezon. Dankon
kaj koran samideanan saluton.

KRONIKO ENLANDA

Pro la dua datreveno de liberigo de Ĉinio la 1-a de oktobro sendis al Centra registaro de la Ĉina Popola Respubliko salutleterojn tiuj ĉi oficialaj aŭ duonoficialaj instancoj en Plzeň: Regiona komitato de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio, Ŝkoda-uzinoj, Uzina Konsilantaro en Ŝkoda-uzinoj, Pilsenaj bierfabrikoj, Fabrika konsilantaro de bierfabrikoj, Fabrika grupo de la Komunista Partio en Pilsenaj bierfabrikoj, Regiona sekretario de Ligo de Batalintoj por Libereco, Ligo por ĉeĥoslovakosoveta amikeco, grupo en Ŝkoda-uzinoj, Distrikta poŝta ofico, Grupo de Komunista Partio en Poŝta oficejo distrikta, Entreprena Konsilantaro en tiu ĉi poŝta ofico, Unueca Nacia Komitato kaj ĝiaj Entreprena Konsilantaro kun grupo de Komunista Partio, Karel Toman, ĉefo de Propaganda fako en Ŝkoda-uzinoj. Kaj kompreneble ankaŭ loka grupo de nia Asocio. La leteroj forsenditaj en mezo de septembro estas en la ĉeĥa kaj en Esperanto tradukitaj de s-o Rudolf Burda, kiu iniciatis tiun ĉi faron spegulantan amon kaj estimon, kiuj enestas en koroj de ĉeĥoslovaka popolo al la popolo ĉina pro ĝia heroo batalo por libereco kaj por pli bona farto. Ni ripetas la varmajn bondeziron ankaŭ sur tiu ĉi loko.

Renkonto kun anglaj esperantistinoj en Mariánské Lázně. La plej granda ĝojo de ĉiu esperantisto estas renkonti kaj paroli kun alilandaj esperantistoj. Ĉe tiu okazo oni konvinkigis ja pri avantaĝo de Esperanto, tiam oni rikoltas la fruktojn de siaj diligentaj kaj klopodo dediĉitaj al ellerno de la lingvo. Ni bedaŭrinde nun preskaŭ malhavas tiun ĉi okazon kaj tial certe ĉiu kapablos imagi mian ĝojon, kiam mi proksimume meze de julio ricevis leteron el Anglujo de samideanino Amy Edwards, kun kiu mi iom korespondis, ke ŝi venos kun granda karavano de siaj samlandanoj jam la 22-an de julio al Mariánské Lázně. Kaj ĉar ili restados sole en tiu ĉi urbo, ŝi petis min, ĉu mi povos viziti ŝin tie, se ŝi ne povos veni al mi. Bedaŭrinde oni sciigis min, ke ĉiuj haveblaj loĝejoj en la urbo estas tiutempe okupitaj kaj ke mi apenaŭ sukcesos trovi ĉambron. Mi tamen veturis la 25-an de julio decidite, reveturi ĉe malbonŝanco. El la stacidomo mi rapidis al la hotelo „Bellevue“ por renkonti la samideaninon. En la hotela halo estis multaj homoj, ĉe aŭdiĝis vigla angla interparolo. Ĉe unu tablo sidis kvar sinjorinoj kaj mi demandis: „Pardonu, ĉu iu parolas Esperanton?“ „Jes, jes,“ aŭdiĝis ĝoja voĉo, „mi parolas Esperanton!“ Estis fraŭlino Whiller el Manchester, kiun mi petis, ĉu ŝi povus venigi s-inon Edwards. Ŝi ne konis ŝin, la karavano ja konsistis el grupetoj kaj unuopuloj el ĉiuj partoj de Britujo, sed ŝi iris demandi la samlandanojn kaj revenis kun sciigo, ke s-ino Edwards ĝuste tiun ĉi matenon forveturis al Praha kaj revenos morgaŭ vespere. Ŝi petis min veni kaj partopreni ilian amuzvesperon. Nia interparolo vekis atenton de la aliaj, estis evidente, ke nia facila interkompreniĝo reciproka faris bonan impreson pri Esperanto.

Sed mi malĝojigis, ĉar, se mi ne trovos loĝejon, mi ja devos forveturi eĉ ne parolinte kun s-ino Edwards. Tamen la sorto ŝajnas favori esperantistojn, hazarde mi ricevis ĉambron preskaŭ en la najbareco de la hotelo Bellevue kaj la plej granda zorgo forfalas.

La venontan vesperon mi venis kun s-ino Holečková el Praha, kiun mi hazarde renkontis sur strato, ĝuste en la momento, kiam la unua grupo de ekskursintoj revenis el Praha, F-ino Whiller demandis pri s-ino Edwards kaj tiu ĉi ĝoje venis post nelonge. Kaj kiam ni laŭ ŝia invito eniris la salonon, alkuris aliaj du samideaninoj el Londono, kiuj aŭdis de siaj samlandanoj, ke s-ino Edwards havas ĉi tie ĉeĥan amikinojn, kun kiu ŝi parolas esperante. Kaj post la amuzprogramo, kiam ni kune altablighis, aperis ankoraŭ unu paro esperantista kaj gaja esp. konversacio miksiĝis kun la angla ĉe la aliaj

tabloj. Poste ni ĉiuvespere kunestis kelkajn horojn bone amuzigante kaj tiamaniere propagandante. Multaj promesis ankaŭ lerni Esperanton, vidinte, kiel bone ĝi servas.

S-ino Brookfield el Londono plendis, ke niaflanke ne estis la okazo sufiĉe utiligita, ke ili devis jam ĉe la alveno esti salutitaj ankaŭ de esperantistoj. Kvankam pri tio ili mem kulpis, ĉar ili ne sciigis pri sia alveno, tamen iomete ŝi pravus. Estis multaj ĉeĥaj angle parolantaj gestudentoj servantaj kiel interpretistoj tie. Ĉu ne povus esti inter ili almenaŭ unu juna esperantisto, kiu ĉiun karavanon (ili alternis ĉiujn du semajnojn) jam ĉe alveno esperante bonvenigus kaj petus la samideanojn anonci sin? Mi ne dubas, ke ankaŭ en aliaj karavanoj estis esperantistoj. Kaj krom Angloj estis tie ja ankaŭ Poloj kaj Hungaroj. Kia bonega okazo por propagando! Kaj kie estis la samideanoj el Mariánské Lázně? B. Vlčková.

En internacia belarta konkurso, organizita de UEA okaze de la 36-a Universala Kongreso, ricevis nia membrino Eva Suchardová 5-an premion pro la poemo „Al Louis de Camoëns“. Ni gratulas ŝin amike.

Trenčín, La Loka Slovakotour aperigis en 1950 riĉe ilustritan prospekton pri sia urbo, slovakingvan, 24 paĝan. Enkonduka teksto (duonpaĝa) „Trenčín bonvenigas vin“ estas krom en la slovaka ankaŭ en Esperanto. La bildoj kaj la mapo de la prospekto eminentas. Ricevebla de E-Inforna Servo en Trenčín, Pod Sokolímami 1675. Ĝi estas jam la dua eldono de tiu prospekto.

Ĉeĥoslovaka Esperantista Junularo aperigis du varbajn flugfoliojn ĉeĥlingvaj kun adreso de nia oficejo kaj kun libera loko por indiki kie „kunvenas la plej proksima rondeto de junaj esperantistoj.“ Ambaŭ komencas per cito de pacodevizo: „La pacon oni ne atendas, por ĝi oni devas batali.“ „Ĉiu el vi ekrigardos nubaron, kiam li el tie ekaŭdos flugmaŝinon. Jes tiom rapide oni hodiaŭ atingas vojaĝcelon. — Same tiom rapide ni atingus celon de la paco, se ni internacie uzadus por internacia interkompreniĝado la lingvon Esperanto.“

Junularo de Praha preparas riĉan Nikolao-programon por ĉiuj gesamideanoj, kiuj ŝatas gajajn amuzon, kanton kaj dancon. La vespero okazos la 8-an de decembro 1951 en Malgranda salono de Slava Insulo, je la 19-a horo vespere.

La gastoj ekster Praha dezirantaj veni, skribu al: **Junularo V. Vyhlička**, poŝt. schr. 46 Praha-XII por rezervigi noktloĝejon. Ni atentigas pri la eblo veturi al Praha kun 50 % rabato, se vi sciigos al ni vian adreson plej malfrue ĝis la 10-a de novembro 1951.

Zamenhof-portreto

Ornamo de ĉiu Esperantista kunvenejo. La librovendejo povas liveri fotografajon 24×30 cm afrankite por Kčs 60,—; en kadro kun vitro, bele aranĝitan, afrankite por Kčs 200,—.

Skriba kurso por komencantoj. E. Klubo en Hradec Králové denove preparis skriban kurson por tiuj, kiuj ne povas partopreni en kursoj parolaj. Oni povas komenci kiam ajn kaj el kie ajn. Pli detalajn informojn petu de Esperantista Klubo en Hradec Králové, Zamenhofova 1010.

NI LEGIS

La 36-a Universala Kongreso en Munkeno la 4—11-an de aŭgusto havis 1977 aliĝintojn el 40 landoj. La solenan malfermon salutis bavara ŝtatministro de edukado, delegito de Registaro de Supera Bavario, delegito de urbeŝtaro Munkena kaj reprezentanto de Federacia Fervojararo Germana; poste salutis la kunvenon reprezentantoj de registaroj, Aŭstria, Belga, Franca, Jugoslavio, Nederlanda, Novzelando, Svedo, Svisa. El la landaj Asocioj parolis delegitoj de la Aŭstria, Belga,

Flandra, Brita, Dana, Franca, Jugoslavia, Nederlanda, Norvega, Sveda, Svisa, Usona; tiuj estas aliĝintaj al UEA. El la nealiĝintaj parolis delegitoj el Egiptujo, Trieste, Islando. UNESKO sendis salutleteron.

La kongreson prezidis D-ro Paul Kempeneers, festparoladon faris D-ro Edmond Privat, la kongresaj laboroj estis dividitaj en kvar sekciojn kiel pasintjare: E. en la edukado de plenkreskuloj, E. en scienco kaj tekniko, E. en internaciaj intelektaj interŝanĝoj, E. en internacia trafiko kaj komerco.

En la ferma kunveno estis akceptita Deklaracio, kiu proklamas:

„La celo de la Esperanto-Movado estas plena apliko de la Internacia Lingvo Esperanto en ĉiuj sferoj de la internacia vivo kaj por ĉiuj internaciaj rilatoj.

El tia vasta uzado de la Internacia Lingvo logike rezultas:

1. altiro de pli larĝaj popoltavoloj al aktiva partopreno en la internacia vivo;
2. progresigo de la scienco kaj plimultigo de la intelektaj interŝanĝoj en internacia kadro;
3. plifirmigo de tuthoma solidareco kaj rapidigo de la unueciĝo de la homaro.“

La somera universitato estis tre bone vizitata. **Prelegis**

Prof. Dr C. Canuto (Parma): Juraj kaj jurmedicinaj problemoj ĉirkaŭ Eŭtanazio (la mortigo laŭ deziro de malsanulo).

Prof. Gaston Waringhien (Parizo): Ideologia dramo de L. L. Zamenhof.

Prof. Dr Edmond Privat (Neuchâtel): Tolstoj kaj Gandhi.

Prof. Ivo Lapenna (Zagreb): Fundamentaj elementoj de federacia ŝtato.

Dro Vincenzo Musella (Roma): Giuseppe Verdi.

Prof. L. Laura (Parizo): Esperanto kaj Mondcivilizo.

Prof. Dr Hugo Sirk (Wien): Kiamaniere oni povas determini la nombron de la molekuloj.

Rektoro Karl Söderberg (Stokholmo): La idea mondo de August Strindberg.

Kunveno de la Propaganda fako de UEA prezidita de Prof. Ivo Lapenna konstatis, ke en la lasta jaro estis farita nova serioza progreso sur kampo de disvastigo de la lingvo. Ĝi interkonsentis interalie eviti estontece precipe en la ne-esperantaj tekstoj la vorton „propagando“ kaj paroli pri informado. La fako mem nomos sin de nun „de informado“ kaj la kunveno rekomendis al UEA starigi apartan Centron de Dokumentado kaj Informado. La Komitato akceptis tion.

En la belarta konkurso ricevis unuajn du premiojn Bojidar Vanić (Jugoslavo) pro poemo Nokto en ĝardeno kaj Vincenzo Musella (Italujo) pro poemo Nokta paŝo.

Dum la kongreso estis inaŭgurita Esperanto-placo ĉe kuniĝo de pluraj belaj stratoj en la urbocentro, ĉe la rando de la fama Theresienwiese vid-al-vide kun la statuego de „Bavaria“.

En kelkaj kunsidoj oni pritraktis „la gazetaran demandon“. Svisa Esperanto-Societo proponis, ke ĉiuj naciaj organoj kunfandiĝu en unu kun apartaj paĝoj por ĉiu nacia asocio kaj kun komunaj paĝoj ceteraj. Ni jam antaŭ la kongreso skribis al la proponinta societo, ke ni rigardas iluzio konjekton, ke tia gazeto povus esti impona multpaĝa revuo. Krome ni rigardas la nacilingvajn paĝojn en nia organo tre utilaj kaj nepre bezonaj. Ankaŭ preskaŭ ĉiuj ceteraj propagandaj gazetoj esperantistaj posedas tiajn nacilingvajn paĝojn. Tio mem pruvas ilian bezonon.

Tiujn informojn ni ĉerpas el artikolo de Georges Agricola en „Esperanto“ el septembro kaj de Teo Jung en „Heroldo de Esperanto“ el 23. VIII. 1951. Tiu ĉi estas pli kritikema pri kelkaj detaloj. Jung avertas „pri tro rapidaj promesoj“. Ekz. en la tabelo pri minimuma

kosto de kongresa semajno estis indikita kiel minimumo inkluzive tuttagan ekskurson al Stranberg-lago nur gmk 24,50. Sed certe la duono de la kongresanoj elspezis tiun sumon, aŭ pli, dum du tagoj. Sed estis ankaŭ facile elspezi tiun sumon en unu tago, ĉar Munkeno montriĝis ne multe malpli kosta restadejo ol kiu ajn alia grandurbo eŭropa.

Esperantista Ligo Izraela deklaris antaŭ al kongreso, ke ĝi protestas kontraŭ elekto de Munkeno kiel kongresloko, ke sekve de tio ĝiaj membroj ne iros tien. La motivoj estas kompreneblaj ankaŭ por ni ĉeĥoslovakoj. En Munkeno komencis naziismo, en Munkeno okazis la malĝoje fama „konferenco“ de la kvar ŝtatestroj en septembro 1938. Ni ne forgesis ankoraŭ. Ni represas, kion pri sinteno de ĉeĥoslovakaj esperantistoj al Munkeno skribis nia prezidanto Adolf Malik en „Esperanto-Servo“ el 15.VI. 1951:

„Jes, la izraelaj esperantistoj pravus, se ili neas veni al Munkeno. Eraris ĉiuj samideanoj, kiuj pledis por la 36a UK al Munkeno, ke la doloroj de multaj en la pasinta milito suferintaj nacioj estas forgesitaj. Oni devis ja ne forgesi, ke precipe en Munkeno, kiel en la tuta Okcidenta Germanujo, restis ankoraŭ multaj nazi-regimanoj, kiuj tute ne ŝanĝiĝis, ja eĉ male, siajn aspirojn ili vidas kreski, dank' al la nov-faŝisma movado, tiom abunde flamigata kaj subtenata de la usonaj okupaciaj oficoj en Okcidenta Germanujo. Certe mankis delikata sento de kongresanoj en Parizo al la animo de izraelaj esperantistoj kaj al ĉiu esperantisto, kiu travivis multajn jarojn de suferado en nazi-regimaj koncentrejoj, kiuj nun la nov-faŝistoj denove planas. La UK en Munkeno povus havi nur tiam sencon, se la tuta kongresanaro sur la teritorio de Okcidenta Germanujo akre protestus kontraŭ la rearmado de Okcidenta Germanujo, kontraŭ la liberlasado de militkrimuloj kaj kontraŭ la persekutado de pachtalantoj en tiu ĉi parto de la Eŭropo, kie ĝermas nova fokuso de pli terura mondmilito. Tiam plenumus nia UK sian mision, tiam ĝi laborus en la spirito de nia Majstro L. L. Zamenhof. Aŭ ĉu vi opinias, ke Majstro Zamenhof, se li estus vivinta, povus facilanime veturi al Munkeno? Mi kredas, ke ne.“

Panteono de la Esperanto-movado ĉe Internacia Esperanto Muzeo en Wien (I. Hofburg) estis solene inaŭgurita la 3-an de junio 1951. Ĉeestis multaj oficialaj reprezentantoj. Federacia kanceliero Ing. Figl estis reprezentita de sekcia ĉefo D-ro Eduard Chaloupka, kiu alparolis la kunvenintaron kaj skizis en sia diskurso ĉiujn farojn, en kiuj aŭstria registaro vidigis sian pozitivan sintenon al Esperanto. Post li parolis eksprezidento de la Aŭstria Respubliko Wilhelm Miklas. Sekvis alparoloj de sekcia konsilisto Dro Maxmillian Führung, el ministerio por instruaferoj, universitata profesoro D-ro Hugo Sirk kaj Hans Jakob, redaktoro de „Esperanto“, veninta por tiu festo el Genevo. Li transdonis salutojn de UEA-estraro kaj emfazis, ke fantaziuloj de la pasinto estas herooj de la estonto. Fondinto de la Muzeo kaj de la Panteono kortega konsilisto H. Steiner povas kun fiero vidi, ke lia ideo efektiviĝis. Post Jakob parolis ankoraŭ eksministro D-ro Hans Frenzel, ĉefsekretario en ministerio por Internaj Aferoj Raimund Čech, advokato D-ro Adolf Halbedl.

La kunvenon prezidis fondinto de la muzeo H. Steiner, kiu skizis en sia diskurso la historion de la muzeo kaj de la Panteono. La muzeo estis inaŭgurita en 1929 dum ĉeesto de tiama respublika prezidento Miklas akceptinta patronecon de la muzeo. Celo de la muzeo estas kolekti kaj konservi ĉiun ajn materialon, kiu koncernas la mondhelplingvan demandon. Panteono estas kreita por honorigi niajn pionirojn, mortintajn kaj vivantajn, en deca loko kaj en deca maniero. La ambaŭ institucioj estas aligitaj al Aŭstria Nacia Biblioteko kaj havas nun je sia dispono 5 salonojn kaj subvencio de la Aŭstria registaro. (Laŭ Informilo de IEMW el julio 1951.)

Ni uzas la okazon por danke gratuli al samideano Steiner pro sukceso de tiu ĉi lia ideo. Nia Asocio jam sendis kaj daŭre sendos dokumentojn por la muzeo kaj por la Panteono.

Pri prononcado de Esperantaj literoj ni enpresis sur p. 19. proponon de G. Waringhien. F. J. Belinfante (Dept. of Physics, Purdue University, Lafayette, Indiana, Usono) faris enketon pri tiu temo, sufiĉe grava, ĉar kun prononcado de a, bo, co, do... ni nepre ne sufiĉas por laŭtlegi formulojn kemiajn, fizikajn kaj matematikajn. La propono de Waringhien estas ne tro facile memorebla. Belinfante faris enketon, al kiu li ricevis respondojn de 70 personoj el 24 landoj parolantaj inter 15 kaj 20 diferencajn lingvojn. Li proponas sekvantajn prononcadojn, kiel la plej oftajn laŭ nombro de la lingvoj, kun kelkaj alternativoj, pri kiuj povos decidi la uzado:

a — be — ce — de — e — ef — ge — haĉ (ha) — i — jot (je) — ka — el — em (me) — en — o — pe — ku — er — es — te — u — vi (vaŭ, ve) — ŭe (ŭov, vove, dobve, duobla ve) — iks — ŭaj (i greka) — zet.

Supersignitajn literojn li ellasis, ili apenaŭ aperas en formuloj. Ni povus uzi „ĉo, ĝo, ĥo, ĵo, ŝo ŭo“ aŭ „ce supersigno“ k. t. p.

Ĉi tiuj literoj estas vortradikoj. Oni formas el ili substantivojn kaj kunmetaĵojn laŭ la ordinara maniero. Ekz.: „Se oni duobligas la uojn, viojn kaj ŭojn en $u^2 + uv + uw$ la funkcio kvarobligas. Ĝia uono estas $u + v + w$.

Por la greka alfabeto plej multaj respondintoj preferas:

alfa — beta — gama — delta — epsilon — dzeta — eta — teta — jota — kapa — lamda — mü — nü — ksi — omikron — pi — ro — sigma — taŭ — ŭpsilon — fi — ĥi — psi — ŭmega. (Laŭ Scienca Revuo, vol. 3, n-ro 2 el 15, 7, 1951.)

Pri nomoj de grandaj nombroj rezultas el la supre citita enketo, ke en 14 el 20 lingvoj studitaj biliono estas 10^9 . En kvin aliaj (la brazil-portugala, franca, itala, pola, usona) biliono estas 10^6 , sed ofte miliardo estas sinonimo, kaj en unu el tiuj kvin lingvoj (la franca) la vorto biliono estas nekutima kaj miliardo estas la ordinara nomo por 10^6 . En unu el tiuj lingvoj (la portugala) biliono signifas 10^9 en laikaj rondoj sed 10^{12} en rondoj sciencaj. Ĝenerale oni esprimis preferon por sistemo N-iliono = 10^6N super la franca sistemo N-iliono = $10^9N - 3$. Ni estas kontentaj pro tiu ĉi konstato, ĉar la unua sistemo estas inter esperantistoj uzata preskaŭ ĝenerale.

Ni uzas la okazon por gratuli al s-o F. J. Belinfante pri lia studaĵo. Lia metodo estas laŭ diversaj vidmanieroj modela.

„Pri nia literaturo inter la mondmilitoj“ estas tre bone informanta artikolo (pli ol 5-paĝa) en The British Esperantist el julio-aŭg. de K. Mc Allister. Lia artikolo ne sole citas faktojn abunde, sed ankaŭ saĝe konstatas literaturajn valorojn de la aperintaj verkoj laŭ vidmaniero de klera leganto. Lia verko estas picnira kaj pro scienca metodo kaj pro funda kono de la temo.

Kongreso de SAT en Stokholmo, unu semajnon antaŭ la Munkena, kunvenigis ĉirkaŭ 600 kongresanojn. Ni bedaŭrinde ne ricevis ankoraŭ Sennaciulon por povi raportoti pri ĝi.

Pac-standardo kun Esperanto-teksto. La fabrika estraro de la Pola Junulara Unuiĝo teksigis pac-standardon por ĝin enmanigi en la tago de la malfermo de la Tria Tutmonda Festivalo de Junaj Pacbatalantoj al Libera Germana Junularo (FDJ) en Berlino. La standardo surhavas tekstojn en lingvoj pola, germana, rusa kaj Esperanto. La esperanta teksto (maldekstre mal-supre) estas: „Antaŭen al la III-a Tutmonda Festivalo de Junaj Pacbatalantoj“. (Konfirmu legon de tiu ĉi informo al Fabrika Estraro de P. J. U. per la adreso:

Jan Reznar, ul. Powst. Slaskich 2, III. p., Glucholazy, pow. Nysa, Pollando. Laŭ Heroldo de E. el 23. VIII.)

La urbo Augsburg aldonas al sia germanlingva varba turista broŝuro unu-paĝan esperantlingvan informon.

Munkeno salutas vin. Tre lukse presita varba broŝuro por turistoj, 16 paĝoj 20×21 cm, multaj ilustraĵoj, spritplena teksto, parolas pri vivo de epoko pasinta, eĉ se ĝi pretendas esti samtempa.

Oficialan organon de la Aŭstralia Esperanto-Asocio „La Rondo“ ni legas ĉiam kun ĝuo, ĉar ĝi informas serioze pri la esperantista vivo en la kvina kontinento, inteligente kaj informite diskutas pri lingvaj demandoj, uzas tre bonan lingvaĵon. Jam la fakto mem, ke ankaŭ en Aŭstralio nia lingvo vivas organizite, konsolas koron de esperantisto. Eĉ se La Rondo nin mokas (jan.-feb. p. 7), ni legas ĝin kun ĝuo, ĉar ĝia redaktoro legas nin atente kaj komprenas, kion ni volis diri. Ne ĉiam estas niaj spertoj same edifantaj.

LOKAJ INFORMOJ

Bratislava. — En kunvenon de la loka SES-grupo en kafejo Metropol la 19-an de septembro venis redaktanto de „Esperantista“ Dr Stan. Kamarýt. Oni preparolis multajn aktualajn problemojn de la movado.

Brno. — Esperantista Klubo eniĝis en klerigan kunularon kiel „Esperanto-Rondeto ĉe Kleriga Komenský-Akademio“. La kunveno restas la sama (hotelo Passage, Lidická 22). Programo de la kunvenoj (ĉiumarde je la 20 h.): 18. IX. Poezia vespero. 25. IX. Ĉapitroj el la mondhistorio (Josef Vondroušek). 2. X. Nekonata Islando (Josef Friedrich). 9. X. Famaj komponaĵoj sur diskoj (Jiří Kořinek). 16. X. Maro, amiko kaj malamiko de Nederlando (Anna Knolová). 23. X. Miaj korespondantoj (Jaroslava Konečná). 30. X. Komponado de Karel Hašler (Libor Kolář). 6. XI. Vespero de konkursoj (Bohumír Horák). **Por rememorigi 50 jarojn de la E. klubo en Brno:** 17. XI. Teatra, muzika kaj amika vespero. 18. XI. Solena kunveno kun artprogramo. 20. XI. Novaj libroj en Esperanto (Rudolf Hromada). 13. XI. Naskiĝtago de prez. Kl. Gottwald (Jaromír Hoffner). 27. XI. Baladisto K. J. Erben (Drahomíra Chlubnová). 4. XII. Nikolaa vespero. 11. XII. Solena artvespero al D-ro L. Zamenhof (Prof. V. Schreiber). 18. XII. Evoluo-teorioj (Ing. Jaromír Šikula). — Antaŭ la programoj: Prelegoj pri historio de nia movado kaj perfektiga kurso. Post la programoj: Informoj pri la movado, aktualaj aferoj, kantoj kaj ludoj. Pliriĉigita biblioteko disponebla.

Brno-Židenice. — La grupo decidis en sia eksterregula ĝenerala kunveno la 26. VII. 1951 eniĝi en Kulturano Klubon en Klement Gottwald-uzinoj en Brno.

Lanškroun. — Du membroj el la junularo partoprenis en Rožnov-kursaro. Du aliaj membroj kiel gvidantoj de junulara resanigejo en Heřmanův Městec turnis atenton de partoprenantoj al Esperanto kaj entuziasmigus por ĝi preskaŭ ĉiujn ĉeestantojn, 12 gejunuloj aĉetis lernolibron, 3 ĉeĉa-esperantan vortaron kaj ĉiuj komencis lerni, du aligis jam al la Asocio. — Junulara peranto estas Jan Werner, Gottwaldova 65, al kiu sendu ĉion por la bulteno „Esperanta Vorto“.

Liberec. — Loka grupo kunvokis eksterregulan ĝeneralan kunvenon la 28-an de sept., kiun partoprenis krom la klubanoj ankaŭ gastoj el Chrastava kaj Jablonec n. N. Post raportoj de funkciuloj kaj klarigo de la situacio, en kiu povos E-kluboj plu agadi, kiun prezentis detale la prezidanto, oni decidis ĉiesvoĉe fariĝi sekcio de Entreprena Klubo de Ĉs Fervojoj (Závodní klub ČSD). Oni esperas pliprofundigi la kluban vivon en novaj kondiĉoj. — La pasinta sezono estis riĉa je klubaj ekskursoj, dum kiuj oni parolis senescepte verde. Unu ekskurso finiĝis per agrabla renkonto kun germanaj samideanoj el Zittau. — La klubo preparas aranĝon de novaj kursoj

por komencantoj kaj progresintoj. Por ĉiu kunveno oni preparas allogan programon. Kunvenoj ĉiumarde je la 19,30 h. en la propra klubejo (Lenin-str. 4 a). — (Pytloun S.)

Olomouc. — Laŭ iniciato de la Junularo estis entreprenita ekskurso al Plumov-baraĵo la 26. VIII. Ĝi havis tian sukceson, ke ĝi estis ripetita la 2. IX. okaze de la distrikta paco-festo. — Al Ĉantoria ekskurso iris 14, al Rožnov-konferenco 25 membroj.

Pardubice. — Esperantista klubo „D-ro Schulhof“ decidis en sia eksterordinara ĝenerala kunveno enigi en uzinan klubon (Závodní klub) ROH-ĈSD Pardubice. La kunvenon ĉeestis 12 membroj kaj prezidanto de la uzina klubo ROH s-ano Kočí. Kunvenoj ĉiumerkrede je la 19-a h. en „Kulturní místnost“ de la stacidomo. Nova adreso: Esperanto - Pardubice, Okrouhlik 811.

Pižeň. — Organizaĵo de oficistinoj en la Urbodomo organizis laŭ iniciato de k-do R. Burda monokolekton, el kiu ili aĉetis nutraĵojn kaj pupon en popola kostumo kaj sendis ilin kun esperantlingva letero (la 12. IX. 1951) per Rono Kyuen Kai al kvinjara knabino Kazuko Saito en Tokio, kies patro estas malliberigita kun pluaj 19 japanaj pachatalantoj pro la Macukaŭa-afero.

Praha. — Programoj de E. K. (ĉiumerkrede en restoracio U Šumavy, II, Stěpánská 3, je la 20,15 horo): 3. X. Internacieco de Esperanto laŭ la lingva vidpunkto kaj en la praktiko (PhDr Aug. Pitlík). 10. X. Pri novaj libroj aperintaj en Esperanto (Rudolf Hromada). 17. X. Japanaj fabeloj (Jaroslav Šustr), 24. X. Filmo ne ĉiam diras veron (Ant. Slanina). 31. X. Aktualajoj (Jar. Mařík). 7. XI. La granda oktobra revolucio (Adolf Mařík). 14. XI. La internacia tago de studentaro (Junularo de E. K. Praha). 21. XI. Pri novaj libroj en Esperanto, II-a parto (Rudolf Hromada). 28. XI. Edukado de kripligitaj infanoj (Josef Vítek). 5. XII. Kongresaj rememoroj (Ančí Bárčochová). 12. XII. Zamenhof-vespero (Artkolektivo de E. K. P.). 19. XII. Kristnaska poezio (Artkolektivo de E. K. P.). 26. XII. Filmvespero (Ant. Slanina). — Krom la fiksitaj programoj: Aktualajoj, Esperanto-kalejdoskopo, Informoj el la movado. — Antaŭ ĉiu vespera programo okazas senpaga perfektiga kaj konversacia kurso je la 19—20 horo gvid. de Ant. Slanina.

Praha. — Klerigaj kunularoj ĉe Distrikta Nacia Komitato (ONV) en Praha 2 invitadis al siaj aŭtunaj kursaroj per 30 000 flugfolioj aldonitaj en fino de aŭgusto al ĉiuj mangokuponaroj en distrikto 2. Inter la 19 kursoj estas ankaŭ tiuj de Esperanto.

K O R E S P O N D I D E Z I R A S

S-o Michel Duc Goniaz, 18-jara seminariano instruista, 12 Place de la République, Paris 10, Francujo, kun estontaj geinstruistoj pri instruado kaj pedagogio, ankaŭ pri literaturo, muziko, lingvistiko, filatelo.

S-o Takayosi Sawada, 1—29 Nishiokicho, Nakagawaku, Nagoya (Jap.), kaj intersanĝi Esp. gazetojn.

S-o Z. Ohmura, Renadaino-chozi, Kamikyo, Kyoto (Jap.), 20-jara studento, pri konstruado de socialismo en ĈSR.

S-o Yoŝio Nezu, Siosaki, Kitakōma-gun, Yamanasi (Jap.), 18-jara studento, Koreo loĝanta en Japanio,

S-o Ryuiti Epihara, Kamisakura-machi, Tana-cho, Miyazaki-ken (Jap.), 16-jara studento, kun ĉs. fraŭlinoj aŭ sinjorinoj.

S-o Tadajoŝi Sibata, 249 Naĝonohoro, Ōgatima Gumma, Gumma (Jap.), 16-jara studento, inters. il. poŝtkartojn.

Mastrumantino honestan, pureman kaj laboreman serĉas inĝeniero iom malsana, precipe malfacile tranta. Skribu sub signo „Kamparo“ al administracio de nia gazeto.

E S P E R A N T I S T A V I V O

Mortis Josef Blažek, supera inspektoro fervojista en pensio en Olomouc, la 9-an de septembro 1951, unu el la plej maljunaj esperantistoj de la regiono Olomouc. Li estis organizita membro de nia movado de post 1909. Pro sia multjara laborado li estis elektita en tiu ĉi jaro honora prezidanto de E. Societo en Olomouc. Ni enskribas lian forpason kun profunda sento de dankemo kortuŝite pro la profunda fideleco al nia movado, kiun li ĉiam vidigadis.

Mortis Josef Socha, direktoro de lernejo e. p. en Litovel, la 30-an de majo 1951, 79-jara. Li estis unu el la plej maljunaj esperantistoj ĉeĥaj, esperantistiginta jam en 1893. Ni enskribis kelkajn datojn pri li en nia III-a jarkolekto sur p. 85. Li aktive partoprenis la movadon dum sia tuta vivo. Restis post li sulko plugita kun obstino kaj persisto.

S-ino Ant. Grossmanová-Vamberová 60-jara la 6-an de novembro 1951. Ni uzas la okazon por saluti samideaninon fidelan al nia movado dum jardekoj kaj deziri al ŝi pluajn jardekojn por ŝia laborema vivo. Ŝi vivas daŭre en L. Bohdaneč.

Doktorigo. JUDr Jaroslav Sucharda en Týniště n. Orli. estis promociita la 28. IX. 1951 en Karlo-universitato. Sinceran gratulon!

Pastrigo. — Antonín Jandík, predikisto de la eklezio ĉeĥoslovaka, estis ordinaciita je pastro la 26-an de aŭgusto 1951 en Náklo. Nia honorinda membro akceptu sincerajn bondezirojn de ni.

Edziĝo. — Niaj membroj Milan Novák el Hradec Králové kaj Věra Simonová el Chlumeč n. C. la 25-an de aŭgusto. Ili akceptu amikajn bondezirojn de siaj kluboj same kiel de ni.

Naskiĝo. — En tiu ĉi rubriko ni enpresas kutime sciigojn personajn unusole pri niaj membroj. Sed hodiaŭ ni nepre faras escepton represante sciigon venintan sur bela duobla karteto bele presita en la portugala kaj en Esperanto. Ni citas la esperantlingvan tekston laŭvorte: „Bauru, la 5-an de junio 1951. Karaj gesamideanoj: Mi sciigas vin, ke mi alvenis hodiaŭ, je la 6-a horo, al Esperantujo, kaj mi estas gasto de gesinjoroj Argentina kaj Luiz Bartholomeu. Mi profitas sciigi al vi, ke mi atendas viajn samideanajn vizitojn. Via nova brazila amiko Gilberto Francisco Bartholomeu, denaska esperantisto, Caixa Postal, 232, Bauru, Estado de Sao Paulo, Brazilo.“ Ni gratulas al la gepatroj kaj al la nova samideano ni deziras feliĉon kaj pacon sur la tero.

OPRAVTE SI LASKAVĖ v ĉlanku Dr Pumpra „Přehled esperantské skladby“ (Esperantista, ĉ. 7—8) tĉchto nĉkolk tiskovĉch chyb, ruŝicĉch smysl textu:

Na str. 79 v odstavci „Formy podmĉtu“ mĉ pŝklad, uvedenĉ v devĉtĉm řĉdku, znĉt: „Mortĉ estas maldolĉe“ (mĉsto: maldolĉe).

Na tĉze stranĉ v odstavci „Nevyjadřovĉnĉ podmĉtu“ mĉ bĉt pod bodem 2 uvedeno, že podmĉt se nĉkdy nevyjadřuje v pŝslovĉch (nikoli: v pŝslovĉch).

Stejnĉ tiskovĉ chybĉ je na str. 80 v odstavci „Nevyjadřovĉnĉ pŝsudku“; takĉ zde jde o pŝslovĉ (proverbo) a nikoli o pŝslovce (adverbo).

Na str. 82 v tŝetĉm řĉdku nahoŝe je uveden vĉraz „norde de la urbo“ mezi pŝklady pŝsloveĉnĉho vĉrazu u. podstatnĉho jmĉna; patŝĉ vŝak na pŝedchozĉ stranĉku, pŝedposlednĉ řĉdek, za slova „malmulte lerte“, t. j. mezi pŝklady pŝsloveĉnĉho vĉrazu („de la urbo“) u pŝslovce („norde“).

Na str. 85 v druhĉm odstavci znĉ zĉvĉr poslednĉ vĉty sprĉvnĉ taktu: „lasante amikon sola oni montras nelojalecon (pŝsloveĉnĉ urĉenĉ vyjadřenĉ pŝchodnikem)“; nikoli: vyjadřenĉ doplĉkem.